




Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2003 numero 1-a: januaro /februaro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de januaro



Nia Celo

Fondi societon en lando
Kiu jam havas milojn, do-
ni al tiu societo solan celon
propagandi artefaritan ling-
von, tiu eble saĝnas al multaj!

Notre But

Fonder une société dans
un pays qui en possède déjà des
milliers, donner à cette société pour
unique but la propagation d'u-
ne langue artificielle ; voilà qui
peut paraître à beaucoup une

La unua numero de La bulteno "**Svisa Espero**" eldoniĝis
ekzakte antaŭ unu jarcento en februaro 1903 kun la celo fondi
svisan esperanto-societon. (Vidu paĝojn.7-9-ajn)

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtako 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI,
Richard SCHNELLER.

SES informas

Redaktaj datlimoj

por la venontaj numeroj

2003-2: marto-aprilo: februare 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de marto.

2003-3: majo-aŭgusto: aprile 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de majo.

2002-4: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencioj de informoj ekde la 15-a de septembro.

2002-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. ☎: 031 921 44 59. Ret-
poŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. ☎: 01 251 50 25.

Retpoŝto: info@esperanto.ch.

Nicole MARGOT, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. ☎: 021 653 14 67.

Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, Chapeau
Rablé 42, 2300 La Chaux-de-Fonds. ☎:
032 914 39 34.

Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

Chiara FABBRI, peranto itallingva kaj jun-
ulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Ret-
poŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo

2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90



Svisa kalendaro

2003-Januare

- 16: Luzern: LES-kunveno.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
23: Basel: ESB: Jarkunveno.
25-26: Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.

Februare

- 03: Lausanne: LES-kunveno.
04: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
04: Wil: EKW: kunveno.
08: Zürich: ESZ: kunveno.
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
21-23: Prés-d'Orvin: Vintra Semajfino de JES.
22-23: Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.
27: Basel: ESB: fonduo ĉe S.-P. Senn.

Marte

- 03: Lausanne: LES-kunveno.
04: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
04: Genève: La Stelo: kunveno.
11: Basel: ESB: renkontiĝo.
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
25: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
27: Basel: ESB: kunveno.
29: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Asembleo de KCE.
29-30: Chaux-de-Fonds: KCE: Monatfino.

Aprile

- 01: Chaux-de-Fonds: CDELI: studrondo.
03-06: Basel: Jarkunveno de SES kaj Kultura Tri-landa Renkontiĝo.
16-22: Savona: 27-a Internacia Junulara Festivalo.
24: Basel: ESB: kunveno.

Maje

- 06: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
10-16: Dresden: 55-a IFEF-Kongreso.

- 17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
17: Printempa Tago de JES.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
22: Basel: ESB: kunveno ĉe B. Spalinger.
29-junio 01: Zürich: Ĉielira Renkonto: Centjara Jubileo Esperanta-Bahaisma.

Junie

- 03: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
26: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

Julie

- 12-19: La Chaux-de-Fonds: 76-a SAT-Kongreso.
19-26: Lesjöfors: 59-a Internacia Junulara Kongr.
26-aŭg. 02: Göteborg: 88-a Universala Kongreso.

Aŭguste

- 24: Basel: ESB: ekskurso.

Septembre

- 25: Basel: ESB: kunveno.
27: Lausanne-Rolle: Centjara jubileo de la fondo de SES kaj komenco de la jubilea jaro.

OktoBRE

- 23: Basel: ESB: kunveno ĉe fam. Focke-Bérout.
25: Ĝenerala Asembleo de JES.

Novembre

- 27: Basel: ESB: kunveno.

Vivo de SES

Svisa Esperanto-Societo kaj Esperanto-Societo Basel kore invitas al Ĝenerala Jarkunveno de SES kaj Kultura Trilanda Renkontiĝo sabate kaj dimanĉe la 5-an kaj 6-an de aprilo kunveno de la evangelia metodista eklezio Riehenring 129, Basel

Ĉar 2003 estas la centjariĝo de la fondo de SES, ni aŭdos kiel SES kreiĝis: Claude GACOND kaj Andy Künzli rakontos al ni pri tiu naskiĝo.

Por marki la komencon de tiu jubilea jaro, la jarkunveno havos festan karakteron.

(Eksterlandanoj, kiuj estas bonvenaj, rajtos partopreni la tutan sabatan programon, ankaŭ la rendevuon de aktivuloj kaj la ĝeneralan jarkunvenon de SES.)

Ni planis feston por la sabata vespero kun muziko kaj balo. Se vi

iel muzike, kante, lude, ktp... povus helpi al la organizo de la programoj de tiu vespero, bonvolu sciigi tion al ni kiel eble plej baldaŭ.

Por dimanĉo estas du ebloj, ĉu iri en la bestĝardenon kaj tagmanĝi tie en la memserva restoracio, ĉu iri al la muzeo Beyeler kaj manĝi en la ĉina restoracio ne tre fora.

Por ke la restado ne fariĝu tro kosta ni ofertas privatan tranoktadon ĉe esperantistoj. Kaj junuloj havas la eblon senpage tranokti en

la kunvenejo mem sur matracoj. Ili kunportu propran dormsakon kaj tukon por kovri la matrakon. Alia eblo estas la junulargastejo. Plie ni povas konsili po unu hotelon en Svislando kaj en Germanio.

Programo

Sabate

- 09h30 Asembleo de SAEF.
Rendevuo de aktivuloj.
- 10h45 Tamburisto.
- 11h00 **Prelegas Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI pri la kreiĝo de SES (kun lego de partoj el la aperonta enciklopedio.**
- 12h00 Aperitivo.
- 12h30 Tagmanĝo.
- 14h00 **Ĝenerala kunveno de SES**
- 16h00 Kafumado.
- 17h00 **Kvizo.**
- 19h00 **Vespermanĝo.**
- 20h30 **Festo.**
- 22h30 **Bonan nokton!**

Dimanĉe

- 11h00 Vizito de la Bestĝardeno.
Vizito de la Beyeler Muzeo.
- 13h00 Tagmanĝo (mempagenda) kaj adiaŭo.
(Programŝanĝoj ankoraŭ eblaj)

Prezoj (en svisaj frankoj)

Jarkunvenoj de SES: senpage.
Aliĝo al la kultura semajnfino ĝis la 15-a de februaro: 20.-
ekde la 16-a de februaro: 30.-

infanoj ĝis 15 jaroj: senpage.
junuloj: ĝis la 15-a de februaro: 10.-
ekde la 16-a de februaro: 15.-
Vespera programo en la aliĝkotizo.

Tagmanĝo sabata:

Menuo A: Salato kaj rizo, kokidaĵo, deserto: 15.-

Menuo B: Salato kaj rizo, ovoj en saŭco, deserto: 12.-

Vespermanĝo sabata:

Menuo A: Diversaj salatoj, ŝinko, deserto: 15.-

Menuo B: Diversaj salatojn fromaĝo, deserto: 12.-

Tagmanĝo dimanĉa:

Bestĝardeno: 12.-

Muzeo: 16.- grupo: 14.-

Aliĝo:

Ĉiuj partoprenontoj bonvolu skribe sendi sian aliĝon al Esperanto-Societo Basel, Postfach 103, 4005 Basel, ĝis la 25-a de marto, donante la sekvajn indikojn:

Familia nomo:

Individua nomo:

Telefono:

Adreso:

Menudeziro:

Aliĝdato:

Subskribo:

Nome de SES kaj ESB, Bruno GRAF kaj Nicole BEROU, kiuj antaŭĝojas ricevi vian aliĝon por kune festi la baldaŭan centjariĝon de SES.

-oOo-

Kion elvokas la centjariĝo de SES?

SES fariĝos 100-jaraĝa en 2003. Tio estas kaŭzo festi jubileon kaj fari bilancon. Plej eble objekte, ĉar facile oni beligas faktojn kaj trompas sin, kiel Ziko Marcus SIKOSEK asertis en la libro „*Esperanto sen mitoj*“.

La jubileo de nia societo estas bone planita de nia esperantologo Claude GACOND. Jam antaŭ jaroj li kreis fonduson por la tiel nomita *Agado 2003* kaj tiel kolektiĝis mono sume 15'000 fr. por digne festi la centjariĝon. Li ankaŭ ellaboris agadplanon, kiu estas akceptita de la estraro kaj de la jarkunveno. Nin atendas la eldono de *Svisa Enciklopedio de Esperanto kaj planlingvistiko*, diversaj jubileaj eventoj, migranta ekspoziceto, ktp. Certe la jubileo densigos la agadon kaj informadon.

La agadplano bone subtenas la laborplanon de UEA, kiu pledas por pli intensaj informado kaj instruado, por profesiiĝo kaj juniĝo. Kiam mi aŭdas tiujn postulojn, mi sentas iun senpovecon. Ne helpas alvokoj al la membraro, pli gravas personaj iniciatoj, kiel ili montriĝas diversloke. Ekzemple en Ĝenevo, kie la Stelo okazigas diversajn kursojn kun deko da lernantoj. Ekzemple

Mireille GROSJEAN, kiu lanĉis informan servon en Romandio. Ekzemple Benno FRAUCHIGER, kiu reaktivigis la junularon. Imponas Claude GACOND, kiu profesie laboras en CDELI kaj ricevas materian subtenon de la bibliotekestro por stabiligi la centron.

Mi ankaŭ esperas, ke la jubilea jaro helpos fortikigi nian komunumon laŭ la slogano de UEA: membro varbu membron. Kiel klariĝas, ke ĉirkaŭ 150 esperantanoj staras ekstere de SES? Ili anas al loka grupo aŭ al UEA, sed ne al SES. Ni klopodos varbi ilin por la tutsvisa societo. SES faras necesan informan laboron, defendas niajn interesojn ĉe publikaj instancoj, interligas la svisajn esperantistojn per la bulteno „*SES informas*“. Ni staru kune.

Kiel SES fartas?

Kiel SES fartas hodiaŭ? Plej simple dirite, SES suferas pro maljuniĝo, depost longe. Tipaj trajtoj de maljuniĝo estas limigita aktiveco, laceco, fatalismo. Pro senintereso pri esperanto mankas ekstera agado kaj varbado, mankas novaj fortoj kaj aktivuloj. Kaj tamen SES vivas, stagnas, sed vivas, danke al fidelaj kaj diligentaj batalantoj. Dum pli sukcesaj fruaj tempoj SES nombris pli ol 600 membrojn, antaŭ 50 jaroj estis eble 300 kaj nun estas ĉirkaŭ

150. La regreso estas evidenta Tre konata esperantisto demandis en studo, ĉu esperanto postvivos la jaron 2045? Tio dependos de la internacia evoluo kaj de la vivopovo de la movado, kiu montris sin ofte mirakla.

Ni akcentu, ke esperanto estas la sola planlingvo, kiu reale postvivas. Kiam ni renkontis novembre en La Chaux-de-Fonds la estraron de ASEPAIX, instruistoj por pac-laboro, ili miris, ke ni parolas esperanton tiel flue kaj uzas ĝin tiel nature. Kiu parolas *Europanton*, tiun miksaĵon de lingvoj, kiu aperis sur la arteplaĝo de Murten? Ver-ŝajne nur la eltrovinto. Tamen ĝi montras, kiel lingvoj povas intermiskiĝi. La germana alprenis multajn francajn esprimojn, kiel hodiaŭ multaj lingvoj alprenas anglajn vortojn, kiuj ankaŭ eniras esperanton. Ĉu tiu kunfandiĝo estos la universala lingvo en la jaro 3000?

Fruaj esperantistoj lernis la lingvon pro la kredo, ke esperanto venkos baldaŭ. Nunaj esperantistoj lernas la lingvon pro ĝia valoro, pro ĝia kulturo, pro ĝia literaturo, fine ankaŭ por kontribui al pli justa lingva mondo. Esperanto evoluis, la motivoj ŝanĝiĝis kaj multiĝis. Ankaŭ se la angla ŝajnas ne haltig-ebla, esperanto konservas sian unikan rolon kaj estas sufiĉe dis-vastigita por praktika uzado. Kial ni

ne argumentas pli konvinke, racie kaj emocie? La jubilea jaro defias nin.

Bruno GRAF, SES-prezidanto

-oOo-

Al la jubileo de la centjariĝo de SES

Unua numero de Svisa Espero

La kovrilo de nia januara-februara bulteno atentigas, ke la unua numero de "*Svisa Espero*", la tiama organo de la fondota Svisa Esperanto-Societo, ekaperis en februaro 1903 kun preciza celo, kiun bone resumas citaĵo el ĝia du-lingva frontartikolo:

"Pruvi al nia svisa legantaro ke la lingvo neŭtrala estas ebla, ke ĝi efektiviĝis, ke ĝi estas uzata praktike; rakonti ĝiajn progresojn, admoni profiti ĝian utilon, doni al la fremdaj esperantistoj sciigojn pri nia lando. = Démontrer à nos lecteurs suisses que la langue neutre est possible, qu'elle est réalisée, qu'elle est entrée dans la pratique; engager à profiter de ses avantages; fournir aux espérantistes étrangers des renseignements sur notre pays."

Komence de la jaro 1903 la tiama provizora komitato de la fondota

Svisa Esperanto-Societo konsistis el la laŭzananoj E. FAILLETTAZ kaj J. FEIERABEND, la friburgano A. Hug, la neŭŝatelano Jean BOREL kaj la ĝenevano Th. RENARD. Ĉiuj estis ekpraktikantoj de esperanto:

"La laboro estas granda; ni estas ankoraŭ malmultaj, nekonataj, nespertaj; ni kuraĝu tion laŭte konfesi. Nur de kelkaj monatoj ni eklernis Esperanton. = La tâche est grande; nous sommes peu nombreux encore, peu connus, inexpérimentés, reconnaissons-le franchement. C'est seulement depuis quelques mois que nous avons entrepris l'étude de l'Espéranto."

Kiel ili venis al esperanto

Sub la titolo *"Espéranto en Svislando"*, en tiu unua numero de *"Svisa Espero"* kroniko rakontas, kiel tiuj homoj venis al esperanto. Priesperanta artikolo de la ĝeneva filozofo Ernest NAVILLE, ano de la tiam fama Franca Instituto (Institut de France), aperinta en marto 1900 en la organo *"Bibliothèque Universelle"* instigis anojn de la studenta societo *"Zofingue"* debati pri la ideo mem de internacia lingvo. Kaj en aŭgusto 1901 la bulteno de tiu studenta societo *"Feuille Centrale de Zofingue"* tre favore raportis pri tiuj diskutoj.

Sed la ĉefa diskoniganto de la zamenhofa lingvo estis la svis-de-

vena pariza lingvisto Théophile CART, kiu regule feriadis dum monatoj en Lausanne ĉe parencoj. En 1901, dum sia aŭgusta laŭzana restado, li organizis esperanto-kurson por la studentoj kaj startigis romandan agad-grupon, kies celo estis la diskonigo de esperanto kaj la fondo de svisa esperanta societo.

Rezulte al la aktiveco de tiu grupo, kiu kunsidis en Lausanne, SES estis fakte fondita en Rolle la dimanĉon 27-an de septembro 1903, sub la patronado de Théophile CART kaj Ernest NAVILLE.

Centjariĝa programo

La centjariĝon de tiu fondo SES digne festos la sabaton 27-an de septembro 2003 okaze de renkonto disvolviĝonta en la decidigaj urboj Lausanne kaj Rolle. Ĉiuj nepre rezervu tiun sabaton en sia agendo.

Kaj ekde la 27-a de septembro 2003 dum tuta jaro, do ĝis la 27-a de septembro 2004, per vico da signifaj aranĝoj ni havos la okazon analizi la plej karakterizajn momentojn de la aktiveco de la SES-anoj dum unu jarcento, tio ĉi en diversaj lokoj de Svislando kaj en kunlaboro kun la lokaj kaj fakaj asocioj kaj eĉ kun publikaj institucioj.

Sed niaj rigardoj ne nur estos turnitaj al pasintaĵoj. Kiel la fondintoj de SES, malgraŭ nia malforto,

ni aktivos favore al la diskonigo de esperanto en Svislando.

En 1903 la ĝenevaj knaboj Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT komencis sian eksterordinare efikan poresperantan agadon. Tial nia jubilea programo ankaŭ raportos pri ilia fruktodona influo.

Tiu jubilea programo estos anoncita en Basel la 5-an de aprilo okaze de la venonta Jarkunveno de SES, kiu havos festan karakteron dank'al la kunlaboro de Esperanto-Societo Basel. Ankaŭ tiun ĉi daton ĉiuj tuj notu en sian agendon.

Claude GACOND.

Donacoj

Donacoj en Frankoj al SES: Anonime: 100; DI VETTA Arlette, Genève: 50; ELSNER Verena, Zürich: 20; FAVRE Alain, Chens-sur-Léman: 35; FREGONARA Odette, Genève: 50; GABBRIELLI Wanda, Carouge: 50; GIANNINI Walter, Zollikerberg: 100; GRABOWSKA Maria, Genève: 10; LOPES Antonio, Echichens: 30; MOROCZ Piroska, Zürich: 20; OERTLE Karin, Bachenbülach: 47; TOMASZCZYK Jozef & Genowefa, Genève: 20; Sume: 532.

Donacoj en Frankoj por la "Agado 2003": Anonime: 200; LAVANCHY Jean-Jacques & Eliane, La Tour-de-Peilz: 50; ROOKE Dieter, Oensingen: 20; SANDOZ André, La Chaux-de-

Fonds: 100; SCHNELLER Martine, Neuchâtel: 86.60; Sume: 456.60.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER kaj la redaktoro Claude GACOND dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

-oOo-

Ĝusta statistika rezonado

1. La japanoj manĝas tre malmulte da grasaĵo kaj havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La hispanoj manĝas multe da grasaĵo kaj ankaŭ ili havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

2. La japanoj trinkas malmulte da ruĝa vino kaj havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La italoj trinkas grandegajn kvantojn da ruĝa vino kaj ankaŭ ili havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

3. La ĉinoj manĝas tre malmulte da terpomoj, kaj havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La rusoj manĝas multege da terpomoj, kaj ankaŭ ili havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

4. La norvegoj nur ete spicas siajn manĝaĵojn kaj havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La hindoj konsumas forte spicitajn manĝojn kaj ankaŭ ili havas, en

statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

5. La vjetnamoj trinkas multe da teo kaj malmulte da kafo kaj havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

La brazilanoj trinkas multe da kafo kaj malmulte da teo kaj ankaŭ ili havas, en statistike signifa mezuro, malpli da korinfarktoj ol la britoj kaj usonanoj.

6. La britoj trinkas malmulte da kafo kaj multe da teo kaj havas tiom da korinfarktoj, kiom la usonanoj.

La usonanoj trinkas multe da kafo kaj malmulte da teo kaj havas tiom da korinfarktoj, kiom la britoj.

Konkludo:

Manĝu kaj trinku kion ajn vi volas, la mortiga faktoro estas paroli la anglan.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Retadreso: CDELI.VCH@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claude.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

Studsabatoj didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude GACOND, Nancy
FONTANNAZ kaj Stefano KELLER
didaktikaj stud-sabatoj okazantaj preskaŭ

ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la sekvajn sabatojn: **2003 januare 18, februare 15, marte 15, majo 17, junio 21.**

Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de F 10.- Senpage por JES-anoj.

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenantoj bonvolu ĉiam letere, rete aŭ telefone anonci sian aliĝon al Claude GACOND:

Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.

Rete: gacond@bluewin.ch.

☎ 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.

Horaro

9h30: Malfermo de la CDELI-salono: ebla aĉeti brokantajn kaj novajn librojn.

11h00: Oficiala malfermo kaj formiĝo de la stud-grupoj. **11h45:** Kafuma paŭzo. **12h00:** **2-a stud-periodo.** **12h45:** Kuna iro al la najbara italeca restoracio Ital'Panini, Serre 25, por la komuna tagmanĝo. **14h30:** **3-a stud-periodo.** **15h15:** Teuma paŭzo. **15h30:** **4-a stud-periodo.** **16h15:** **Konkludo de la renkonto en la CDELI-salono,**

kie eblas resti por teumi, babili, akiri librojn ĝis la propra forirmento. 17h30: **Oficiala fermo.**

Enirejo al la CDELI salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo, kiu estas ŝlosita sabate. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu trovigas maldekstre de tiu pordo, kaj iu tuj venos.

Por atingi la bibliotekon

El la stacidomo: La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

Aŭtomobile: Aŭtomobiloj ne parku sian veturilon en la biblioteka korto, sed en la najbaraj stratoj. Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

Raporto

La novembra studsabato grupigis dudekon da partoprenantoj: duone esperantistoj, kiuj laboris en la CDELI-salono kun Mónica MOLNAR el Hungario, duone pedagogoj el la movado ASEPAIX (*Association suisse des éducateurs à la paix*), kiuj matene kunsidis kun sia koleginino Mireille GROSJEAN kaj al kiuj posttagmeze Claude GACOND prezentis esperanton. Komuna tagmanĝo kunigis ambaŭ rondojn.

Jen kiel Mónica MOLNAR raportis pri sia tre efika didaktika laboro kun 9 studemuloj:

"Komence de la tago ili povis ek-koni unu la alian demandante sin, sed la posta paroliga ludo donis eĉ pli da eblo por pli bone ekkoni unu la alian ol kiom ĝenerale

donas la kutimaj "Kiu vi estas?" – "Kie vi loĝas?"... ktp demandoj.

Por la "Urbo-ludo" ili formis 4 grupojn kaj ricevis kvaron-parton de urbo-mapo, sur kiu estis indikitaj nur iuj ĉefstratoj kaj la ĉefpunktoj de la horizonto. Poste ili devis kolekti vortojn, kiuj rilatas al urbo, por kio ili povis uzi kiel helpon la urbo-liston de [edukado.net](http://www.edukado.net).

La grupetoj havis la taskon desegni sur la mapojn tiujn aferojn, kiuj por ili estas havendaj, gravaj en la urbo. Ili devis argumenti, kial ili bezonas tiujn. Ili ricevis poetojn por konstruaĵoj, institucioj, ktp, kiujn la aliaj ne enmetis.

*Poste ili devis doni nomojn al la stratoj laŭ famaj homoj, pri kiuj ili povas diri ion. Por plenumi tiun ĉi taskon, ili povis konsulti la libron *Enciklopedio de Esperanto*.*

Fininte la laboron, ni kunmetis la kvar partojn de la urbo, ĉiuj prezentis sian urbon, respondis la demandojn de la aliaj, argumentis. Ĉiuj montris sian domon en la urbo, invitis iun al sia hejmo kaj klarigis la vojon.

*La rezulto estis bela, interesa, foje tute nekutima, kio fakte instigis la partoprenantojn al vigla diskuto. La **Urbo-ludo** enhavas multajn eblojn por paroligi la homojn kaj fakte ĝi estas daŭrig-*

*ebla ĉiam, ĉie, je iu ajn nivelo. Por la komencaj paŝoj oni povas ĉerpi ideojn el la tre utila retpaĝo de **edukado.net**, kaj la daŭrigo dependas nur de la fantazio.*

*Pro tio, ke en la grupo estis homoj, kiuj instruas esperanton aŭ interesiĝas pri atingeblaj materialoj aŭ por instrui aŭ por mem progresi en la lingvo, ni okazigis retan prezentadon pri la servoj de **edukado.net**, kiu povas esti tre efika helpo ankaŭ por lernantoj, sed ĉefe por instruistoj, instruantoj.*

Ni vidis, kie ĝi troviĝas sur la reto <http://www.edukado.net/>; kial, por kiuj ĝi kreiĝis; kiel oni povas uzi ĝiajn katalogon, lernilotekon (pri ili la partoprenantoj povis trafoliumi ankaŭ kolore presitajn foliojn en dosierujo), retligojn, ktp.

La tie trovitaj esperantaj ludoj havis sufiĉe grandan sukceson.

La servo kaj ĝiaj materialoj plej parte estis tute novaj por ili, kaj ili vere ĝojis malkovri tiujn eblojn.

Ĉiuj tre bone laboris, pro tio mi esperas, ke ĉiuj povis iumaniere pliriĉiĝi dum la studhoroj kaj estis kontentaj fine de la tago.

Mónika MOLNAR

Produktiva staĝo

Unu el la orientiĝoj de la aktiveco de Claude GACOND estas sin ĉirkaŭi de kompetentuloj pri planlingvistiko kaj didaktiko, kiuj povu transpreni la gvidadon de CDELI, kiam la estraro de la Biblioteko serĉos posteulon. Tiucele li invitis la hungaran pedagoginon kaj studentinon pri interlingvistiko por kvarmonata staĝo. Fakte tiel ne nur ĉe CDELI deĵoris Mónika MOLNAR, sed ankaŭ en la lernejo "La Grande-Ourse", kie esperanto estas instruata.

Jen porinforme ni publikigas la raporton, kiun Mónika MOLNAR liveris pri sia tre pozitiva staĝo, kiu komenciĝis la 19-an de aŭgusto kaj konkludiĝis la 20-an de decembro.

"Dum la 4-monata periodo la laboro disvolviĝis laŭ du ĉeflinioj:

- bibliotekaj laboroj en CDELI,
- instruista laboro en L'Ecole de la Grande Ourse.

En CDELI:

- esploro kaj studado de la lingvo Occidental helpe de ĝia ĉefperiodaĵo, "**Cormoglotta**" (1922-1971) kaj interretaj nocioj.
- lernado kaj ekuzo de la biblioteka registrad-programo.
- komenco de registrado de vasta plurlingva korespondado inter la aŭtoro de Occidental kaj liaj adeptoj fare de la biblioteka

registrad-programo (legado, resumo de la leteroj, bazaj- kaj teknikaj datumoj pri ili, kompilado de serĉvortoj al la enhavoj).

- lernado kaj aplikado de la ĝusta maniero por konservi dokumentojn.
- konservado de la registritaj dokumentoj.
- helpo dum vesperaj studgrupoj.
- gvido de paroligaj kursoj dum studsabato.
- sistema reordigado de libroj.
- detala, algoritm-stila priskribo de la komputila registrad-programo, uzita en la biblioteko.

En L'Ecole de la Grande Ourse:

- unusemajna marŝtendumado kun la lernejo praktikante esperanton.
- poste semajne po 3 esperanto-lectionoj por la gelernantoj 12-14 jaraĝaj.
- semajne po 3-4 esperanto-lectionoj por la gelernantoj 6-12 jaraĝaj, kiuj dum la antaŭlasta semajno faris belajn prezentojn kun ekspozicio en esperanto pri memelektitaj temoj.
- rapidkursejo por infano alvenanta decembre en la lernejon.
- foje apartaj kunsidoj kun la instruistinoj, helpo en traduko de infanlibroj.
- helpo en la traduko, ĝisdatigo kaj komputila prizorgado de la lern-eja hejmpaĝo.

Konkludo:

En ambaŭ lokoj mi provis fari kiel eble plej bonan laboron laŭ miaj

kapabloj. Mi esperas, ke pli-malpli mi sukcesis en tio.

Mi konscias, ke la laboro devas esti daŭrigota ambaŭloke, kaj se iam estos mi, kiu havos la okazon daŭrigi ĝin, mi volonte kaj konscience provos antaŭenirigi la aferojn, ja mi tre ŝatis labori same en la biblioteko, kiel en la lernejo kun la tieaj simpatiaj help-emaj kaj kunlaboremaj homoj.

Mónika MOLNAR, La Chaux-de-Fonds, la 20-an de decembro 2002.

Registro de la ricevitaĵoj aperos en venonta bulteno. Tamen la prizorgantoj de CDELI esprimas sian dankemon al ĉiuj liverintoj de libroj, revu-numeroj, dokumentoj, fotoj, kongresaĵoj, ktp.

JES

Junularo Esperantista Svislanda
Jeunesse Espérantiste Suisse
Junge Esperantisten der Schweiz
Gioventù Esperantista Svizzera
Giuventetga Esperantista Svizzer
Postfach 3324, 4002 Basel
· Telefon-numero: 061 301 2705

jes@skol.ch

Prezidanto: Benno FRAUCHIGER
Sekretario: Joëlle GROSJEAN

Aldone al "Svisa Esperanto-Societo informas" 2003-1 malkovrebilas la numero 2 (decembro 2002) de la informilo de Junularo Esperanta Svislanda (JES). Tiu bela revuo "Jes? kompreneble...".

atestas, ke novaj fortoj leviĝas en la esperanta Svislando. Inda je apogo morala kaj eĉ financa estas nia junularo, kies prezidanto Benno FRAUCHIGER konkludas la 44 lastajn tagojn de sia civil-servado per deĵorado en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds favore al CDELI. Li interalie kontribuos al la perkomputila registrado de la CDELI-arkivo. Povu lia restado ĉe CDELI instigi aliajn junulojn de JES provi efektivigi sian civilan servon (anstataŭe al la soldat-servo) profite al la daŭriĝo de la arkivado de la riĉaĵoj amasiĝintaj ĉe CDELI.

Ĝojiga novaĵo: Joëlle GROSJEAN (la filino de Mireille) elektiĝis sekretario de JES.

Notindaj estas la sekvaj aranĝoj:
Februare 21-23: Prés-d'Orvin: Svisa Vintra Semajnfino de JES.

Aprile 16-22: Savona (IT): 27-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) organizita de Itala Esperantista Junularo.

Maje 17: Printempa Tago.

Julie 19-26: 59-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Lesjöfors, (SE).

Oktobre 25: Ĝenerala Asembleo.

Claude GACOND, iama junulo!

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch

Elekttoj

Kandidatoj al la Komitato

La kandidatoj, kiujn la Komitato proponas por la elekto al la Komitato de KCE nun estas oficialaj kaj povas esti anoncigitaj. Ili estas:

Daniel MÜHLEMANN, prezidanto.
Perla MARTINELLI, vicprezidanto.
Dieter ROOKE, sekretario.

Nature eblas pliaj kandidatiĝoj, kiuj laŭstatute devus esti anoncigitaj al la prezidanto Sonja BRUN almenaŭ unu monaton antaŭ la Asembleo kun skriba konsento de la interesatoj kaj la subskribo de almenaŭ tri voĉrajtaj kunvenontoj.

La nova Komitato elektiĝos okaze de la Ĝenerala Asembleo de la 29-a de marto, kiu komenciĝos ĉe KCE je la 09h30.

Estas kunvokitaj la apogantoj kaj la membroj de la Kultura Konsilio. Ĉiu donacinto rajtas ĉeesti la Asembleon, sed ne rajtas voĉdoni.

Apoganto estas ĉiu, kiu finance subtenis KCE-n per kontribuo de almenaŭ CHF 180.- en 2002. Donacinto estas ĉiu, kiu donacis pli malaltan sumon.

Pliaj detaloj estos publikigitaj en "*Heroldo de Esperanto*" en januaro 2003.

Sonja BRUN

Indas rememorigi, ke Daniel MÜHLEMANN prezidis Svisan Esperanto-Societon dum unu jaro de aprilo 1972 ĝis aprilo 1973.

Claude GACOND

Monatfinoj

Post la sukcesplenaj kultura monatfino pri *Kvaropo* en novembro kaj zamenhofologia semajnfino meze de decembro KCE daŭrigos ankaŭ en 2003 la "Kulturajn Monatfinojn". Nove estas proponitaj paralelaj stud-rondoj por progresantoj, gvidataj de Perla MARTINELLI.

Datoj kaj temoj:

Januare 25-26: La Fundamenta Krestomatio.

Februare 22-23: Nocioj pri lingva juro.

Marte 29-30: Eseoj omaĝe al Ivo LAPENNA.

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurbühstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

55-a IFEF-Kongreso

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Dresden 10-16.05.2003

Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) invitas ne nur la membrojn de IFEF kaj iliajn familianojn, sed ankaŭ ĉiujn geamikojn de esperanto, al la venonta IFEF-kongreso en Dresden, metropolo de la lando Saksio en orienta Germanio. Tra la urbo fluas la riverego Elbe, kies grandega inundo en somero 2002 kaŭzis nemezurbelan damaĝon. La riparaj laboroj intertempe grandparte finiĝis.

Svisaj interesatoj, kiuj ŝatus partopreni tiun ĉi kongreson, petu la detalan informilon rekte al Gertrud EGGENBERGER, la prezidantino de SAEF.

Claude GACOND



Grupa vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, ☎ 0049 76 214 57 12

Kunveno: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Raporto 2002

Jen kion faris la bazelaj esperantistoj en 2002:

En januaro okazis ilia ĝenerala jarkunveno kaj fine de la februara monato ĉiuj grupanoj estis invititaj de Hans-Peter SENN por manĝi bonegan rakledon laŭ la tradicia stilo de duona fromaĝo sub hejtulo. La etoso estis tre agrabla.

Marte ili skrablumis kaj aprile Hans-Peter SENN interese prelegis kun belegaj lumbildoj pri sia vojaĝo al Andaluzio kaj Benno FRAUCHIGER organizis esperantokurson.

En majo okazis la jam tradicia vizito al Berthe SPALINGER por manĝi bonegajn nudelan salaton kaj desertaĵon sur ŝia agrabla teraso.

En junio ili minigolfumis en "Grün 80" kun la lernantoj de la esperanta kurso de Benno FRAUCHIGER. Post la konkurso ĉiuj babileme sidis sur la teraso de la restoracio.

Kun belega vetero la somera tradicia promenado kondukis la grupon al la aŭtomatoj de la Muzik-Muzeo en Seewen sub la gvido de Hans-Peter SENN. Estis vere tre bela ekskurso.

En septembro la grupo ŝanĝis sian kunven-salonon. Ili havas nun novan pli malgrandan sed pli belan kunvenejon en la kelo de la malantaŭa domo ĉe Riehenring 129. Ĉiu rakontis pri siaj ferioj kaj oktobre dum inform-vespero pri esperanto tre bone prelegis Benno FRAUCHIGER. Fine de la monato komenciĝis nova esperanto-kurso.

En novembro la bazelanoj planis sian novan programon por 2003.

Kaj la Zamenhofa Festo, kiu okazis la 7-an de decembro en salono kun bele ornamitaj tabloj, grupigis 40 partoprenantojn, kiuj venis ne nur de la proksimeco ĉirkaŭ Basel, sed ankaŭ el Freiburg am

Brigau, Mulhouse, Strasbourg kaj Zürich. Prezure ĉiu retrovis malnovajn amikojn kaj konatiĝis kun novaj vizaĝoj. Ĉeestis pluraj simpatiaj gejunuloj.

Laŭ la bulteno "Sud-Rejna Kuriero" N° 9 (januaro 2003).

Venontaj kunvenoj

2003 Januare 23 20h00: Ĝenerala Jarkunveno, en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Tagordo: 1. Bonvenigo; 2. Elekto de la tagprezidanto; 3. Protokolo de la ĝenerala jarkunveno 2002; 4. Aliĝoj kaj ekziĝoj; 5. Raportoj de la prezidanto, de la kasisto kaj kaskontrolantoj; 6. Senŝarĝigo de la estraro; 7. Elektoj de la prezidanto, vicprezidanto, kasisto, kaskontrolantoj kaj de sekretario; 8. Kontribuo al KCE, pacmovado kaj junuloj; 9. Proponoj.

Februare 27: H.-P. SENN invitas al ĉina fonduo, je la 19h00 ĉe li. Ĉiuj estas bonvenaj, sed nepre aliĝu ĝis la 15-a de februaro: Tel.: 06113016258.

Marte 11 (marde): Renkontiĝo sub la arkadoj de la Kunst-museum, 19h30 "Gugge und Gässle".

27: Ludvespero: ni ludos skrablon.

Aprile 24: Lumbildoj pri Sicilio.

Maje 22: Invito ĉe Berthe SPALINGER.

Junie 26: Minigolfo en "Grün 80".

Aŭguste 24: Ekskurso.

Septembre 25: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

Oktobre 23: Invito ĉe la familio BEROUD-FOCKE.

Novembre 27: Programo 2004.

Bern

Esperanto-Grupo

Kunvenoj la duan mardon de la monato je la 19h30 (krom dum festotago) en Restoracio Möwenpick im Wächter, angulo Neuengasse 44 / Genfergasse 4. Kiuj volas scii, ĉu io okazos aŭ ne, voku Margrit GULDIN telefone: 031 381 56 74.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Esperanto-infos: Ø 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 10-a horo.

Venontaj kunvenoj

Marto 4: Ĝenerala jarkunveno.

Ĉiusemajne okazas renkontoj paroligaj:

Konversacia kurso kun Claude PIRON la jaŭdon de la 12h00 ĝis la 13h00, ĉe Maison du quartier, Plainpalais, 1 rue de la Tour.

Esperanto-babilado la lundon ekde la 18h30, ĉe Restoracio Les Cheminots, rue des Gares 7.

Charles BAUDOIN

La revuo "Brazila Esperantisto" en junio 2002, numero 319, en sia rubriko "pskologio" dediĉis 5 paĝojn al interesa artikolo de Claude PIRON pri Charles BAUDOIN, sub la titolo "Forgesita saĝulo: esperantisto Charles BAUDOIN".

Tiu revuo estas konsultebla ĉe CDELI, same kiel centoj da aliaj esperanto periodaĵoj, kie abundas legindaĵoj.

Claude GACOND.

Henri VATRE

Svisa Esperanto-Societo decidis finance faciligi la eldonon de verko de la ĝenevano Henri VATRE, kiu estas projektita de la eldonejo Iltis sub la titolo "Tekste kaj Pretekste". En aŭtuno 2001 Richard SCHNELLER sciivoleme pri la stato de la preparlaboroj rekte petis informojn de la eldonejo Iltis, kaj de Reinhard HAUPENTHAL li interalie ricevis tiun ĉi respondon:

"... Kiam finiĝos la kompostado de la nun prilaborataj verkoj ni revenos al Tekste kaj Pretekste por definitiviĝi la kompostafon. Konante la amplekson ni petos prez-oferton kaj poste anoncos la libron je subskripcia prezo kun difinita lim-dato de ties validoj..."

En letero de la 3-a de septembro 2001, kiu akompanis kopion de la antaŭvidita enhavo de "Tekste kaj Pretekste", Richard SCHNELLER al-

portis tiujn ĉi sciigojn, kiuj certe interesos niajn legantojn:

"Henri VATRE ja ne pletore verkis, sed varie kaj bonstile. Jam lia unua libro *Specimene* (1962), sub la preŭdonomo Henri BEAUPIERRE, atestis pri lia funda kono de la esperanta literaturo. Rimarkindas ankaŭ ke la aŭtoro de la *Neologisma glosaro nur spareme uzis novvortojn, almenaŭ originale kaj eble iom pli traduke (Nokta flugo, Tero de la homoj, ambaŭ el ANTOINE DE SAINT-EXUPERY, 1985).*

Ĝojiga fakto estas, ke Svisa Esperanto-Societo probable faciligos finance la eldonon de tiu verko de la ĝenevano Henri VATRE post ekkono de la preskostoj. Tio eblus per rabato por membroj aŭ aĉeto de ekzempleroj."

Kaj Richard SCHNELLER konkludis sian informan mesaĝon per la vortoj:

"Kun la espero ke tiu libro jam anoncita en la *Bibliografio de la verkaro de Henri VATRE (1994) fine aperos, mi sincere salutas vin*"

Mi publikigas tiujn ĉi faktojn por atentigi la eldonejon Iltis, ke en Svislando almenaŭ kelkaj beletremuloj konservas la esperon povi foje akiri kaj frandi "Tekste kaj Pretekste".

Claude GACOND.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

☎: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Diskuta rondo: ĉiun trian lundon kun François RANDIN, en Chailly-Lausanne. Bonvolu telefone voki lin antaŭe 021 657 14 59.

Venontaj kunvenoj

2003 Januare 13.

Februare 3: Ĝenerala Asembleo.

Marte 3.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

☎ 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz BRÜGGER en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Venonta kunveno

2003 Januare 16: 14h00: kun Franz

BRÜGGER: paroliga leciono kaj 14h30:

intervjuo pri la kosmo.

Kantono de Neuchâtel La Chaux-de-Fonds

Studaj rondoj ĉe CDELI

Dum la lastaj vesperoj ĉiuj alportis kaj klarigis ludojn. Tio kreis tre agrablan paroligan etoson.

Datoj notindaj en via agendo:

2003 Januare 21.

Februare 04 kaj 18.

Marte 04 kaj 25.

Aprile 01.

Maje 06 kaj 20

Junie 03 kaj 17

Eniro en la CDELI-salonon eblas ekde la 19h45. Studo de la 20h00 ĝis la 21h45. Fermo de la salono je la 22h00. Alvenantoj premu la sonorilan butonon, kiu trovigas maldekstre de la enirpordo al CDELI. (Nord-orienta pordo de la Biblioteka Domo).

Claude GACOND.

Tiĉino

La "Piazzetta Esperanto" en la kvartalo Solduno en Locarno alinomiĝis la 12-an de oktobro ricevante la nomon "Piazzetta Dante BERTOLINI". La tasko de nia movado estas atentigi la frekventantojn de tiu placo, ke la poeto Dante

BERTOLINI verkis en la itala kaj en la esperanta lingvoj.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil.
Ø 071 911 68 30

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Venonta kunveno

Februare 5: Jarkunveno.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH
Ø 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

Kunvenoj: la 2-an mardon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

Venontaj kunvenoj

2003 Januare sabate 11:

11h00 – 14h00: Monata kunveno:

Komuna maten-manĝego kun kultura konversacio-rondo.

Februare sabate 8:

11h00-14h00: Ĝenerala kunveno.

Komuna matenmanĝo kaj poste oficiala kunveno laŭ statuta tagordo kaj eventualaj proponoj. Poste konversacioa rondo.

Regelmässige Treffen – regulaj renkontiĝoj:

Akazienstrase 6 en 8008 Zuriko.

2003: Ek-de 2003 la regulaj renkontiĝoj anstataŭ marde okazos la duan sabaton matene je la 11h00 kun komuna maten-manĝego.

Antaŭ-informo

(Rezervu la daton!)

2003 maje 29 ĝis junio 1 – ĵaŭdon-dimanĉo en Zuriko.

(2002-05-29 estas la Ĉieliro de Kristo, do festotago en multaj lokoj)

Seminario pri la komunaj radikoj de la esperanto-movado kaj la bahaismo en Svislando okaze de la 100-jara jubileo de Svisa Esperanto-Societo kaj de la bahaa religio en Svislando.

Jam antaŭviditaj programeroj:

Prelegoj pri la unuaj bahaanoj en Svislando nome Fritz SEMMLE kaj August FOREL.

Studo de historiaj dokumentoj kiel korespondado de Fritz SEMMLE kun Lidja ZAMENHOF, la familio BLUMENTAL, Martha ROOT kaj aliaj.

Riĉa kultura programo, invitita estas ekzemple la Zurika Bahaa Koruso. ktp. ktp.

(Ni ivitas per ĉi-tiu mesaĝo Bahaan Esperanto-Ligon kaj ties membraron al aktiva kontribuo kaj subteno)

Loko:

Esperanto-Librejo, Akazienstr. 6, 8034 Zürich.

